

N° 181  
janvier  
février  
mars  
2018

# LA INFORMILO

N° 181  
januaro  
februaro  
marto  
2018

l'espéranto  
la langue de l'amitié  
sans frontières

**esperanto**  
France-Est

**ESPERANTO**  
**2018**  
*Justa komunikado*

Esperanto  
la lingvo de l'amikeco  
sen landlimoj

## ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle  
pour la promotion  
de la langue  
internationale

### ESPERANTO

regroupant  
les départements

**Bas-Rhin (67)**

**Haut-Rhin (68)**

**Meurthe-et-Moselle (54)**

**Meuse (55)**

**Moselle (57)**

**Vosges (88)**

Maison des Jeunes  
et de la Culture

"Philippe Desforges"

27, rue de la République

**FR-54000 NANCY**

**ABONNEMENT / ABONO**

Papera versio: 17€

Reta abono: 7,50€

Un Français nouveau Secrétaire  
Général de UEA  
(Universala Esperanto-Asocio)



Pour les espérantophones français il n'est pas un inconnu! Aleks KADAR a été membre du comité directeur, puis Secrétaire Général, puis Président d'Espéranto France. Désormais une grande partie de ses activités ne se déroulera plus à Paris, mais à Rotterdam (Pays-Bas), où il a été élu par le comité de l'association à une confortable majorité de voix au poste de Secrétaire Général de l'Association Universelle d'Espéranto. UEA fédère plus d'une centaine d'associations nationales d'espéranto sur les cinq continents.

**Ne forgesu aliĝi al nia printempa staĝo,  
kiu okazos la 20/22ajn de aprilo 2018**

**en Rimlishof apud Buhl  
Guebwiller. Programo kaj  
aliĝilo en ĉi-tiu numero.**



# LUMINESK

*Nova silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio*

Jen jam okazis la tria Luminesk fine de 2017 en Haltern am See, en okcidenta Germanio proksime de la urboj Essen kaj Münster. Ĉi-foje ĝi komenciĝis jam la 27an de decembro kaj finiĝis la 3an de januaro 2018.

En la kadro de GEA Germana Esperanto-Asocio, Andreas Diemel estis la ĉefa organizanto, helpata de Alfred Schubert, de Barbara kaj Ulrich Brandenburg kaj aliaj kunhelpantoj.

Ni loĝis en komforta domo "Gottfried Könzgen-Haus" kiu situas sur la monto Annaberg en arbaro. Ĝi estas vasta klerigejo de katolika sindikata movado.

Ĉi-foje la domo-mem disponigis al ĉiuj partoprenantoj, okaze de matena kaj posttagmeza paŭzoj, diversajn trinkaĵojn, kafon, teon, eĉ kuketojn.

Tio aspektis tre simpata.

La akcepto en la domo estis rapide farita kun transdono de la dokumentoj kaj ĉambro-ŝlosiloj. Poste necesis orientiĝi en tiu 3-etaĝa domo, en kiu ni disponis pri du salonoj, por la prelegoj kaj distraj vesperoj.

La interkonan vesperon de la 27a de decembro iniciatis kaj prizorgis Korine Cheizoo. Ŝi proponis al partoprenantoj montri malnovajn fotojn pri sia junaĝo. Okazis diskutoj kaj babiladoj por provi rekoni la koncernajn personojn. Certe iuj estis facile rekoneblaj, aliaj tute ne.


Alia propono estis, ke la partoprenantoj kunportu el sia regiono specifajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn. Tiel ĉiuj povis frandi diversajn kuketojn, tortojn, fromaĝojn kaj ĝui interesajn alkoholaĵojn, fortajn, mildajn, delikatajn. Jen ovo-likvoro, bova okulo (brando kun gutoj da lakto) ktp.

Tio estis vere agrabla interkonatiĝo, ne nur kun la homoj, kiujn ni plej-parto jam konis, sed ankaŭ kun iliaj lokaj produktoj.

Tiel komenciĝis tiu tria Luminesk.

En la postaj tagoj jam funkciis la programo kun 2 samtempaj prelegoj matene, plej ofte interrompitaj per kafo-paŭzo. En la posttagmezo okazis 2-foje 2 samtempaj prelegoj, filmoj aŭ aktivaĵo.

Jen s-ino Wera Blanke prelegis pri malnova belulino, pri Nefertito kaj Ehnatono, drameca epizodo el la egipta historio. Tiuj eventoj okazis proksimume ekde la jaro 3150 a.K. en Egiptio, sed estis nekonataj al la nuna homaro, ĝis la komenco de la 20-a jarcento.



En la vespera programo Barabara Brandenburg deziris doni antaŭ-guston pri la lando de la venonta UK, ĉefe pri la portugalaj vinoj.

Ŝi klarigis pri la specioj kaj gustumigis diversajn vinojn blankajn, ruĝojn, sekajn kaj pli mildajn. Ĉiuj havis ankaŭ sian glason, kiun oni plenigis per nova specio.



La 29an de decembro jam okazis la unua tuttaga ekskurso per aŭtobuso. La unua celo estis al malnova ŝipolevujo (kiu iel anstataŭas kluzojn) Henrichenburg.



Ankaŭ tie troviĝis akvo-kruĉiĝo.



Fakte temis pri kanalo-ponto super iu rivero. Ni grimpis ligno-turon tra heliko-forma ŝtuparo por vidi la vastan ebenan pejzaĝon.

Kvankam oni proponis kunporti piknikaĵojn el la matenmanĝejo, plej multaj preferis mendi tagmanĝon en la restoracio-mem, en kiu, ni ĉiuj kunsidis.

Posttagmeze ni vizitis la antaŭ-fortikaĵon Burg Vischerin. Tre interesa konstruaĵo ĉirkaŭita de akvo. Ĝi apartenis de pluraj generacioj al la sama familio, tamen ĝi ne estas komforta loĝejo.

Ni ĝuis la interesajn informojn de la gvidanto, kiu



bone klarigis pri la komplikaj vivo-rilatoj en tiaj familioj. Pri la specifaj metiistoj, kiuj ne nur vendis ĉiu-tagajn bezonataĵojn, nutraĵojn, ilojn por kudrado, sed kunportis informojn aŭ eĉ klaĉaĵojn.



La vizito finiĝis en la apuda trinkejo kun kafoj kaj ege bongustaj kukaĵoj.

Sub la neĝo ni atingis la aŭtobuson por hejmenveturi.





Jen nova ideo en tiu vespero. Estis proponita keglo-ludado, en kiu ne nur spertuloj povas venki, laŭ reguloj elpensitaj de Alfred Schubert.

Jen Korine pretis defii la aliajn ludantojn. Ja necesis ne nur trafi plej multajn keglojn, sed ankaŭ lerte noti la poentojn.

Sed la plej lastaj programeroj de la vespero estis la knajpo en kela ĉambro, kie eblis trinki bieron kaj aliajn alkoholaĵojn. Sed ĝin plene konkurencis la gufujo prizorgita kaj Joshie kaj Dieter Kleemann. Tie estis proponitaj diversaj teoj, sed plej grave, iuj partoprenantoj intervenis per diversaj rakontoj kaj ŝercoj. Tio kreis ege agrablan etoson kaj bonan humoron.



Eks-diplomato Ulrich Brandenburg prelegis pri la kriza politiko de Eŭropa Unio, ĝia historio kaj estonto. Alfred Schubert klarigis kiel krei simplajn ret-paĝojn (foto + teksto) per "wordpress 1". Bodo Ehrlich proponis ekzercojn por trejni la cerbon per moviĝo. Dieter Rooke scivoleme vizitis en 2017 Nordan Koreion helpe de Esperantistoj el Pekino kaj lima urbo Dandong. Li montris fotojn de la lando, sed eble ne sukcesis konvinki la publikon, ke temas pri "vere tute normala lando". Ĉu oni sukcesis mistifiki lin?



Alfred Schubert montris bildojn pri diversaj Esperanto-aranĝoj, inkluzive pri la IFEF-kongreso okazinta en Colmar kaj parte en Mulhouse, kiun li ja partoprenis.

En la vespero Barbara Brandenburg proponis kvizon pri kuirado iom ligita al Portugalio. Kvar homoj estis premiitaj por iĝi "majstrokuiristo" en posta vespero. Tri el ili akceptis partopreni la konkurson pri kuirado, por prepari fruktosalaton kun diversaj ingrediencoj. La tri-persona ĵurio taksis la tri preparaĵojn laŭ gusto kaj aspekto. S-ino Liu Jun gajnis la titolon "majstrokuiristo".



En la silvestra vespero, antaŭ la balo, la koruso sinprezentis.

Kiam aŭdiĝis la muziko de Polonezo, tiam tute spontane kreĝis la jam konata parado, sen plia preparado. Malgraŭ tio, ĝi estis sukcesa, kaj la ceteraj spektantoj varme aplaudis, tiam la balo povis komenciĝi kun la muzikoj de Rob.

Ĉe noktomezo la domo mem metis je dispono taŭgan ŝaŭminon en la granda enirhalo.

Taŭga loko por interkisadi kaj bondeziri "Feliĉan novan jaron".

Tiel finfine ni sukcese atingis la novan jaron 2018.

En la unua de januaro okazis la novjara promeno. Iuj estis ekipitaj por nordeca baston-promenado gvidataj de Bodo Ehrlich. Bedaŭrinde la vojoj estis ne tiom facilaj kaj la grupo iom dispeciĝis, ĉar ne ĉiuj povis sekvi. Eble mankis iom da antaŭ-preparo.

En la vespero Ulrich kaj Barbara Brandenburg rakontis pri sia krozado de Italio al Argentino. Komence estis kelkaj etapoj al haven-urboj de Eŭropo. Sed poste dum la trans-oceana navigado, kiu daŭris 3 aŭ 4 tagojn, la sola

pejzaĝo estis la vasta oceano.

Fine ĉe alveno en Bonaero eblis vidi pli variajn pejzaĝojn kaj rekonii kelkajn monumentojn de la ĉef-urbo de Argentino.


En la 2a de januaro okazis la dua tuttaga ekskurso al grava historia urbo Monastero (Münster).

**Dieter Kleemann** volonte rakontas pri tiu urbo kaj pri ties grava historia signifo.

Ekskurso al Monastero (Münster) La tuttaga ekskurso al la ĉefurbo de la regiono, Monastero, okazis sub gvido de la GEA-Prezidanto Ulrich



Brandenburg, kiu vivis dum junaĝo en tiu-ĉi urbo. Per loka trajno ni atingis la urban stacidomon kaj piede ni eniris la malnovan urbocentron. Ni haltis sur la granda foiroplaco kun la katedralo Sankta Paŭlo, kiu estis konstruita en la 13-a jarcento-laŭ arkitektura aspekto transiro de romanika al gotika stilo. Tre alloga por turistoj estas la Astronomia Horloĝo



interne, teknika majstroverko de la jaro 1540. Ĉiutage, je la 12-a horo tagmeze, aperas la figuroj de la tri reĝoj kiuj dufoje kliniĝas antaŭ Maria kaj la kristinfano.

Monastero estas potenca Episkopejo en norda Germanio, Universitata Urbo kun pli ol 50000 gestudentoj kaj pli ol 500000 bicikloj!

La plej grava historia loko en la urbo estas la urbodomo kun la "Paco-salono" ("Friedenssaal").

En la jaro 1643 la urbo Monastero estis deklarita "Neŭtrala Urbo" por la internacia packonferenco, kiu devus finfine fini la t.n. "30-jaran eŭropan militon". Ĝis la jaro 1648 venis pli ol 150 reprezentantoj de multaj nacioj kaj religiaj potenculoj, vera Centro de la Eŭropa Diplomatio.

Ni havis ŝancon eniri tiun faman Salonon kaj admiri la originan internan arkitekturon (artvalora ligna skulptita surfaco kun ĉiuj portretoj de la reprezentantoj), kiu estis savita antaŭ la bombado de la urbo dum la 2-a mondmilito.

Kiel rezulto de tiu plurjara internacia konferenco estis finfiksita kaj deklarita packontrakto inter Hispanio kaj Nederlando la 15-an de majo 1648! De tiam Nederlando estis tute memstara nacia ŝtato. Kompleta fino de tiu "Vestfalia Paco" estis la 2-a de oktobro 1648.

Svedio kaj Francio postulis limigon de la imperiestra centra potenco. Ankaŭ Svislando ricevis ĉi-tie ŝtatan suverenecon. Krome gravas ke oni agnoskis la juran egalecon de la du ĉefaj Konfesioj-Katolikismo kaj Protestantismo.

La agrabla fino de tiu tre interesa urba promonado okazis en "Pinkus Mueller", tre tradicia studenta gastejo kun memfarita biero kaj lokaj manĝaĵoj!

En la lasta adiaŭa vespero eblis ĝui la pian-koncerton de Ludger Schmeink.

Ĉe la fino Andreas Diemel deziris danki ĉiujn kunlaborantojn kaj kontribuantojn, kiuj iel helpis al la sukceso de tiu semajno.

Refoje la loka biero estis taŭga donaco al ili.

Krome li konfesis, ke jam okazis espleroj por la organizado de la venonta Luminesk', ie en centra Germanio.

Li promesis, ke ĉi-foje la informoj pri venonta Luminesk' estos pli frue diskonigitaj, por povi allogi pli da homoj.

Tiam eble ankaŭ vi ŝatus partopreni tiun aranĝon kaj ĝui alian etoson.

Raportas Andreo  
kaj Dieter,  
fotoj de Andreo



# La 12a MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO **2018**



Restadejo Val d'Esquièrè – Les Issambres – Francio (Lazura Marbordo)

24a de februaro – 3a de Marto 2018

Jen la tradicia printempa rendezuo por pluraj samideanoj, kiuj deziras kune ĝui la komenciĝantan printempon en agrabla Esperanto-etoso. La hotelo Vacancier plene taŭgas por tia semajno ĉe la Lazura Marbordo.

## La 12-a Mediteranea Esperanto-Semajno en "Les Issambres"

Revenis la gesamideanoj al tiu printempa semajno, ĉe Mediteranea bordo. Multaj jam estis konataj de antaŭaj jaroj. Partoprenis preskaŭ 100 geesperantistoj el deko da landoj. La ĉefaj organizantoj estas *Christine Graissaguel* kaj *Monique Prezioso* kun helpo de aliaj esperantistoj. Certe multaj venis ankaŭ por ĝui la pli favoran printempan veteron en la sudo, ĉe la marbordo. Tamen ĉi-jare la vetero ne estis tre favora, preskaŭ dum la tuta semajno pluvis kaj eĉ neĝis. Dum en nordaj landoj oni anoncis froston je  $-13$  gradoj, tie estis  $+2$  gradoj. Sed ja necesis rezigni pri agrablaj promenadoj kaj ekskursoj ĉe la marbordo. Eĉ la komuna fotado ne povis esti farita ekstere sur la teraso.

En dimanĉo estis proponita vizito al ĉokolada foiro en *Roquebrune-sur-Argens*. Ankaŭ tie la vetero mallogis komercistojn kaj klientojn. Ne plu estis la etoso de antaŭaj jaroj.

La programo konsistis el diversnivelaĵoj de veraj komencantoj ĝis la plej alta "diskutoj kaj analizoj", kiujn gvidis respektive Christine GRAISSAGUEL, Jarka MALA el Ĉeĥio, Kristin TYTGAT el Belgio kaj Nina PIETUCHOWSKA el Pollando. Ili okazis en la mateno kaj antaŭ la vespermanĝoj.

En la vesperoj okazis interesaj kulturaj prelegoj kaj prezentadoj de fotoj pri Islando, Afrikaj landoj, Bizonoj



en Pollando. *Kristin TYTGAT* el Belgio fakulino pri la rusa lingvo kaj *Nina Korĵenevskaja* el Rusio prelegis pri Rusio. Ilaj opinioj pri tiu vasta lando tute kongruis.

En apuda salono eblis akiri plej diversajn malnovajn librojn brokante venditajn.



La duontaga ekskurso proponis viziton al la urbo Menton proksime al la itala landlimo. La veturado estis iom longa por atingi tiun foran urbon. Tie eblis viziti la tre imponan feston de "Citronoj" kun la ekzotika temo "Barato". Multaj skulptaĵoj estis prezentitaj sub-ĉiele. Tiu vizito estis ja bona rekompenco al tiu longa aŭtobusa veturado. En apuda konstruaĵo estis ekspozicio pri plej diversaj orkideoj.



La lasta vespero, kiel kutime en ĉiuj E-aranĝoj konsistis el prezentadoj de ĉeestantoj. La kursanoj pretigis diversajn amuzajn skeĉojn, deklamon de poemo kaj estis sprite klarigitaj kelkaj konfuziloj. La koruso ege talente plezurigis la publikon per belaj kantoj kaj melodioj. La vespero finiĝis per dankoj al la organizantoj kaj kursgvidantoj. Sekvis dancado akompane de akordiona muziko.



### Jen kion skribas Martine DEMOUY pri tiu semajno:

Finon de februaro ni ĉeestis la nun famkonatan "Mediterranean Esperanto-Semajnon". Se vi aŭdas 'mediteranea', vi tuj pensas pri suno kaj maro! Certe la maro estis, sed tute turmentita pro la ŝtormo. Kaj la sunon anstataŭis pluvo, vento kaj NEĜO! Nekredeble!

Tamen ni havis tre agrablan semajnon kun kvar diversaj kursoj, kiel kutime. Mankis la "altnivela kurso", vera prelego, al kiu ni dum plurjare al kutimiĝis, sed ni povis alimaniere cerbumi kaj interŝanĝi, ĉar ni ofte laboris en etaj grupoj, en kiuj ni ankaŭ multe ridis. Kaj tio estas tre bona por la sano, ĉu ne?

Posttagmeze ni ne povis fari longajn promenadojn, sed ĉi-jare eblis aliĝi al koruso, kaj kelkaj el ni elektis kanti, anstataŭ promeni tra la vento, la pluvo, la neĝo aŭ la ŝtormo. Kaj tiuj bone elektis ĉar ili havis grandan aplaŭdon vendrede vespere dum la festo, kiu konkludis la staĝon.

Tre memorinda estas la ekskurso al Menton por admiri la belajn skulpturojn el oranĝoj kaj citronoj, sed ĉi-jare, sub la neĝo. Ne multaj povas fieri pri tio! Sed ni, jes!

Sabate ĉiuj adiaŭis la aliajn, kelkfoje plurfoje, ĉar disiĝi ne estas facila afero, precipe kiam oni devas forlasi tian agrablan etoson, kia ĝi estis en MES 2018. Dankon al la organizantoj kaj ĝis MES 2019!



Raportas Martine kaj Andreo  
fotoj de Andreo



Karaj gesamideanoj,



La revo de ĉiuj esperantistoj raŭmistaj aŭ finvenkistaj estas facila tutmonda interhoma komunikado pere de la internacia lingvo Esperanto. Kaj aperis mirakla helpilo: la perreta komunikado facila kaj tuja. Sufiĉus..., ke ĉiuj eklernu nian lingvon kaj jen: la fina venko!

Sed ni analizu la realon: rapide niaj samideanoj – post la tradiciaj gazetaj komunikoj, bultenaj artikoloj, limakaj leteroj, telefono - komunikis per ret-mesaĝoj, dissendolistoj, retejoj kun belaj retpaĝoj..., kiujn necesas aktualigi kaj regule konsulti. Sed iom post iom krome multiĝis la internaciaj retaj entreprenoj, kiuj akre konkurencas inter si kaj aperis Fejsbuko, Twitter-o, Snapchat, kaj pli kaj pli da aliaj! Sen paroli pri konkurencaj samcelaj asocioj!

Kaj jen: la homoj kreis novan BABELON, kiu malhelpas efikan komunikadon. Ni daŭre plu-pedalas en la saŭkraŭto!

Kion vi opinias?

E.L.

En la retpaĝo <http://punkto.info> kuniĝas podkasto kaj aliaj retaj projektoj Preskaŭ ĉiusemajne aperas nova episodio de la podkasto kern.punkto pri io ajn en Esperanto, sed ne pri Esperanto. Jen la lastaj temoj:

KP120 Koreio - Interparolo pri interesa orient-azia lando

KP121 Muzikaj agordoj - Interparolo pri la historio de la manieroj agordi muzikilojn

Pliaj episodoj vi povas trovi en la arkivo: <https://kern.punkto.info/arkivo/>

Kelkfoje okazas tujaj elsendoj. Pliaj informoj: <https://kern.punkto.info/tuje/>

Neregule aperas la episodoj de la podkasto movada-vid.punkto pri Esperanto-movadaj temoj. Jen la lastaj temoj:

MvP012 Umujo - Nova interreta revuo en Esperanto

MvP013 Muzaiko - Diskuto pri la estonteco de grava instanco de Esperanto-kulturo

Pliaj episodoj vi povas trovi en la arkivo: <https://movada-vid.punkto.info/arkivo/>

Kelkfoje okazas tujaj elsendoj. Pliaj informoj: <http://movada-vid.punkto.info/tuje/>

Ĝuu la aŭskultadon hejme aŭ survoje.

Amike, Julia.

## La socia reto Amikumu lanĉiĝis

### De Jarlibro al "Horlibro"

En sabato, 22-a de aprilo, lanĉiĝis nova socia reto, Amikumu. Ĝi estas uzebla per saĝtelefonoj kaj montras la cent plej proksimajn Esperanto-parolantojn, kiuj membras en ĝi.

#### Jam pli ol tri mil aliĝintoj

Ene de unu semajno aliĝis jam pli ol tri mil homoj el certe almenaŭ kvindek landoj. En kelkaj grandaj urboj membras jam pli ol deko da Esperanto-parolantoj.

#### Kontaktu la retan Esperantujon - aliĝu al Amikumu!

Amikumu donas bonan eblecon por kontakti aliajn Esperanto-parolantojn - oni renkontiĝas unue en la reto kaj povas poste interkonsenti pri rendevuo eksterrete. Jen nova ebleco por trovi la enretajn Esperanto-parolantojn, kun kiuj ĝis nun ne tro facilis eksterreta kontakto.

Por ke tio funkcii, necesas ke ankaŭ la homoj el la tradicia Esperanto-komunumo aliĝu al Amikumu kaj prezentu sin tie. Instrukcioj kiel fari troviĝas sur <https://amikumu.com> kaj sube.

#### De jarlibro al "horlibro"


En 1908 Hector Hodler lanĉis novan ideon - jarlibron, kiu faciligis trovi aliajn Esperanto-parolantojn. La nova ideo, kiun nun realigis Chuck Smith kaj Evildea kun sia teamo, 109 jarojn post Hodler, estas iusence nova versio de jarlibro. Sed tiun ĉi version ni povas nomi "horlibro" (se ne "minutolibro"), ĉar ĝi estas daŭre aktualigata.

Nun vojaĝanto povas kontakti ne nur la lokulojn en ilia hejmo, sed pere de Amikumu ankaŭ aliajn vojaĝantojn, kiuj hazarde troviĝas samloke. Kaj la lokulo povas vidi, kiu vizitas lian aŭ ŝian urbon.

Espéranto France-Est				Orient-Franca Esperanto-Asocio.	
<b>La Informilo</b>		Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale <b>ESPERANTO</b>		Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo <b>ESPERANTO</b>	
<b>Rédaction:</b> <b>Redaktoro:</b>		Edmond Ludwig kaj André Grossmann		S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:		Article manuscrit à éviter Texte envoyé par courriel doc, odt Document avec mise en page (PDF) marges identiques à cette page-ci		un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre	
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.					
Komitato de la Asocio			Comité de l'Association		
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso		
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr		
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr		
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.69.54.46.93	andreo.ag15@sfr.fr		
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	jean-luc.thibias@laposte.net libroservo.efe@laposte.net		
Aliaj komitatanoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr		
Assesseeurs	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.46.93	michelinecolnot@orange.fr		
	S-ro Jacques HERLÉ	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net		
	S-ro Jacques PINEDA	03.89.42.88.54	pineda.ventron@gmail.com		
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10			
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr		
	S-ino Madette AST	03 87 01 32 85 06 70 94 11 84	madette20@hotmail.fr		
	S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr		
	S-ino Catherine HEL	03.83.47.63.07	cathello@laposte.net		
	S-ro Yves STUTZ	03.89.39.83.14	stutzyves@gmail.com		
S-ro Gilbert STAMMBACH	03.88.96.67.59	gilbert.stammach@gmail.com			
<b>Abono al La Informilo</b> →	17 eŭroj	reta abono: 7,50 eŭroj	← <b>Abonnement à La Informilo</b>		
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	<b>Esperanto France-Est</b>		← <b>Paiement par chèque au nom de</b>		
Pagoj per ĝiro al jena konto →	<b>CCP 1997 72 W NANCY</b>		← <b>Paiement par virement au compte</b>		
Per internacia ĝiro →	IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY				
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier		
1. Aleks Kadar - Unesko Kuriero	15. Staĝo en Rimlishof	<p align="center"><b>ISSN 0291 6037 trimestriel</b>  <b>N° CPPAP : 0409 G 83517</b>  bulletin d'information bilingue sur l'espéranto  édité par l'association culturelle  <b>Esperanto France-Est</b>  MJC PhiJippe Desforges - 27 rue de la République  <b>54000 NANCY</b>  Directeur de la publication : <b>Edmond LUDWIG</b>  Rédacteur provisoire : André Grossmann  Dépôt légal : <b>30 septembre 2013</b>  Imprimé par l'imprimerie Sprenger</p>			
2. Lunmineks en Haltern am See	16. Libroj 2017				
3. Lunmineks en Haltern am See	17. Libroj 2017				
4. Lunmineks en Haltern am See	18. Salou				
5. Lunmineks en Haltern am See	19. Enigmaj kaj anekdotoj				
6. Lunmineks en Haltern am See	20. Abonoj kaj kotizoj				
7. MES en Les Issambres	21. Barato				
8. MES en Les Issambres	22. Barato				
9. Angulo de la prezidanto	23. Kostariko				
10. Komitatanoj kaj Menuo	24. Kostariko				
11. Avula Angulo	25. Nia vilaĝo				
12. Libro-servo	26. TAKE en Kubo				
13. Agad-raporto Osiek	27. TAKE en Kubo				
14. Staĝo en Rimlishof	28. Vintra Foto-paĝo				

**AVULA ANGULO**

Armand HUBERT

*... alflugas rememoraĵoj!*

02

**MANIFESTE 2000 : « Graines de paix » / semgrajnoj de paco**

« Écrites en 2000, ces phrases deviennent encore plus urgentes aujourd'hui. »  
*Redaktitaj en 2000, tiuj frazoj hodiaŭ eĉ pliurgas.*

« La culture de la paix en 6 phrases simples :

1. Respecter toutes les vies ;
2. Rejeter la violence ;
3. Libérer sa générosité ;
4. Écouter pour se comprendre ;
5. Préserver la planète ;
6. Réinventer la solidarité. »

> « Parce que je suis conscient de ma part de responsabilité face à l'avenir de l'humanité, et en particulier des enfants d'aujourd'hui et de demain. »

> *Ĉar mi konscias pri mia individua sindevontigo al la homara estonteco, specife al tiu de infanoj, hodiaŭaj kaj venontaj.*

*La kulturo de paco per 6 simplaj frazoj :*


1. Respekti ĉiujn vivojn ;
2. Rifuzi perforton ;
3. Liberigi sian malavarecon ;
4. Aŭskulti por interkompreniĝi ;
5. Ŝirmi la naturon ;
6. Ree solidarecon eltrovi.

Kiel la ses flankoj de ĵetkubo.

« Faites connaître le MANIFESTE 2000 autour de vous ! »

Signez le MANIFESTE 2000  
sur Internet  
[unesco.org / manifeste2000](http://unesco.org/manifeste2000)

*La flankoj de la ĵetkuboj  
ne ricevis siajn numerojn  
laŭ la teksto.  
Lokigu la taŭgajn ciferojn !*

**ABSOLUTA SILENTO**

*Dume koŝmarigis mondmilito, mia lorena regiono (départemento Moselle) estis aneksita al la nazia "Reich" ĝis ĝia Liberigado en 1944-45.*

*Dum mortigo kaj submetigo furiozis mondscale, ofte kaj kaŝe triumfis la vivo !*

lun someran tagon de la jaro 1943, en nia vilaĝeto, okazis aventuro al mia kuzo, Arturo.

Li kolektis frambojn ĉe limo de arbaro malfor de la vilaĝo. Jam vesperiĝis. Aŭdinte la sonorilon de la preĝejo, la junulo suriris la hejmvoyon. Jen el arbitaĵo ekstaris viro. Ne vilaĝano, ne konatulo, sed hirta kaj aĉvestita barbulo. Liaj gestoj kaj humila sinteno rivelis homon en granda mizero.

La surprizo kaj timo estis tiel streĉaj, ke la kuzo ŝtoniĝis kaj mutis, tamen pretiĝis por rapide forkuri.

La aperinta silueto plue kaj insiste gestis, klarigante sian suferon pro malsato.

La kuzo hejmen hastis kaj korbate informis siajn gepatrojn.

La mizerulo eble estis militkaptito, kiu sukcesis eskapi el lagero, el militkoncentrejo. Aŭ eskapinto el ia perfortanta etoso. Reĉkaptado signifus suferegon por li, aŭ eĉ pli.

Ege konfuziĝis la geonkloj pro dilemo. Jen estis savinda homo kies vivo proksimiĝis al kolapso. Aliflanke, perfidaj okuloj neeviteble gvatis en la vilaĝo por kapti nepermesatan paŝon.

La gepatroj de la kuzo elektis la neracian alternativon, t.e. la decidon helpi. Per etaj gestoj unue. Baldaŭ la afero ne plu ĉeseblis.

Arturo do kaŝe nutris la mizerulon, plurfoje po semajno per eta pakaĵo. Jen estis gustoplena peco da pano kun ovo, aŭ kun tranĉo da lardo. La du aktoroj neniam montris sin kune; la elŝanĝoj okazis senvorte, el malproksimeco, en la arbaro.

Kaj kiam alvenis la vintro, la geonkloj akceptis la eks-kaptiton en sian fojnejon. Ĝis kiam alvenis la Liberigado.

Dume mi, nenion eksciis pri la okazaĵo ! La geonkla instrukcio vortumis : "absoluta silento !"



# El nia libroservo

## Informoj



--> La libroservo partoprenos la venontan komunan regionan staĝon en Rimlishof . Preskaŭ ĉiuj el niaj 700 libroj kaj kasedoj atendas vin!  
La listo de la libroj aĉeteblaj ĉe nia libroservo aperas en la retejo de Esperanto France-  
Est: <http://esperanto.france.est.free.fr>. Se iu precipe allogas vin: avertu min per  
retmesaĝo, mi nepre kunportos ĝin (sed vi ne estos devigata aĉeti ĝin)!

Ĝis baldaŭ!

Jean-Luc Thibias  
libroservo.efe@laposte.net



## Nove alvenintaj libroj



①



②



③



④

- 1) **Metodo 11**, lernolibro, **Opo**, Esperanto France, 2018, 144 paĝoj. **9€**  
Nova, tre belaspekta, eldono de la unua parto de instrulibro por komencantoj, 11 lecionoj ligitaj al sonregistroj atingeblaj per la reto (mp3),
- 2) **Lupo Alberto**, Bildrakonto, **Silver**, Edistudio, 2010, 7,50€ Bestoj rolas homojn.
- 3) **La ĵurnaleto de Joĉjo**, infanlibro, **Vamba (Luigi Bertelli)**, Edistudio, 2009, 244p, 18€  
Petolaĵoj de Johaneto Stoppani alinomita Joĉjo Tempesto.
- 4) **Esperanto ne estas nur lingvo**, legolibro, **Spomenka Ŝtimec**, ?, 2002, 24 p, 4,50€  
Legajaĵo post baza kurso laŭ la zagreba metodo.

### Por mendi librojn:

1. Vi sendas vian mendon
  - per poŝto al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDOEUVRE (uzante la ĉi-suban mendilon)
  - per ret-poŝto al "libroservo.efe@laposte.net"
  - nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.
2. Vi baldaŭ ricevos viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj)
3. Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al "libroservo 2800-76 H NANCY" (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per ĉeko je la nomo "libroservo" sendita al la adreso de la libroservo.  
Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al "LIBROSERVO"  
**IBAN** : FR 98 20041 01010 0280076H031 97  
**BIC** : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo.

<i>Mendilo</i>		Bonvolu sendi tiujn librojn al apuda adreso:
S-ro / S-ino		
En	la	Subskribo:

## Agad-raporto de Esperanto-France-Est (Orienta Francio) por 2017

### IFEF-kongreso (fervojistoj)

**Kunlaboro de Esperanto France-Est, Mulhouse-Esperanto, TAKE kaj la estraro de IFEF por la kunorganizo de la internacia IFEF-kongreso (fervojistoj), de 15-a de majo ĝis la 24-a de majo 2017 en COLMAR. 147 aliĝintoj el 22 landoj.**

### Ege sukcesaj kongreso kaj postkongreso (multnombraj ekskursoj sub varmega suno)

**La tradicia "Printempa staĝo" okazis preskaŭ samtempe de la 19-a ĝis la 21-a de majo 2017 kune kun la IFEF-kongreso en Colmar. Do 25 pliaj aliĝintoj.**

**Amika tago**, la 25-an de junio 2017 en la Vogezoj, organizita de Ginette MARTIN. Ĝi kunigis samideanojn el Germanio kaj Francio ĉirkaŭ komuna pikniko kaj vizito en Le Syndicat (apud Saint-Amé) al la muzeo TERRAE GENESIS (Historio de la tero kaj de ŝtontranĉistoj)

Partopreno de nia kasisto André GROSSMANN en la ILEI-kongreso de Busan kaj la UEA-kongreso de Seulo.

**Gaja Semajnfino en Schwäbisch Gmünd.** Partopreno de kelkaj samideanoj en la aŭtuna staĝo tradicie organizita de BAVELO (Baden-virtemberga Esperanto-ligo) 06-a ĝis 08-a de oktobro 2017.

La 18-an kaj la 19-an de novembro samideanoj deĵoris en **Ungersheim** ĉe la **foiro pri ekologio kaj justa komercado**.

**Trilanda ZAMENHOF-FESTO en Bazelo** kun samideanoj el Svislando, Germanio kaj Francio.

Dank'al la klopodoj de André GROSSMANN aperas ĉiutrimestre (rete kaj papere) la riĉe ilustrita kolora bulteno **LA INFORMILO** kun interesaj vojaĝ-impresoj de niaj samideanoj.

Jean-Luc THIBIAS daŭre okupiĝas sukcese pri la **LIBROSERVO**.

André GROSSMANN daŭre prizorgas la **retejon de EFE**:

<http://esperanto.france.est.free.fr/>

Jacques HERLÉ diligente skanas malnovajn ekzemplerojn de LA INFORMILO por kompletigo de la **historio de la EFE** en nia retejo.

## 30-a Internacia Esperanto-Konferenco

Temo:



# ESPERANTO EN ARTOJ


21-a ĝis 27-a julio 2018 en kastelo Grésillon (Francio)



Riĉaj prelega, kultura kaj turisma programoj

Pliaj informoj kaj aliĝiloj ĉe: [osiek.org/iek](http://osiek.org/iek)

<b>Organizita de</b> <b>MULHOUSE</b>  <b>ESPERANTO</b> En amikaj rilatoj kun BAVELO	<b>83a printempa</b> <b>staĝo de</b>  <i>France-Est</i>
	<b>Okazos la 20 / 21 / 22-ajn de aprilo 2018</b> <b>En la Feriejo RIMLISHOF 3, rue de Rimlishof</b> <b>68530 BUHL apud Guebwiller</b>



Ĉi-tiu ferio-komplekso situas ĉe monto-flanko en Buhl apud Guebwiller en mirinda parko. Ĝi troviĝas survoje inter Guebwiller kaj Markstein.

Proksimaj stacidomoj:  
Colmar, Mulhouse,  
Bollwiller

<b>ALIGOJ kaj Restado-kostoj</b>	
Ĉef-aliganto abonanta "La Informilo"n aŭ loĝanta ekster Francio	30 €
Ĉef-aliganto ne abonanta "La Informilo"n kaj loĝanta en Francio	47 €
Kun-aliganto (sama adreso kiel ĉef-aliganto)	18 €
Junulo inter 10 kaj 25 jaroj	12 €
Infanoj malpli ol 10 jaroj	3 €
<b>Ĉambro kun 2 ĝis 5 litoj kun necesejo kaj duŝejo</b>	
Kompleta pensio (1 tranokto + 1 matenmanĝo + 2 manĝoj)	61 €
Duon-pensio: (1 tranokto + 1 matenmanĝo + 1 manĝo)	53 €
Suplemento por individua ĉambro	12 €
<b>Ĉambro kun 2 ĝis 8 litoj necesejo kaj duŝejo sur sama etaĝo</b>	
Kompleta pensio (1 tranokto + 1 matenmanĝo + 2 manĝoj)	51 €
Duon-pensio: (1 tranokto + 1 matenmanĝo + 1 manĝo)	43 €
Suplemento por individua ĉambro	10 €
<b>Prunte-ricevo de supra lito-tuko kaj tualetaj tukoj</b>	<b>7 €</b>
<b>Apartaj manĝoj</b>	<b>15,30 €</b>

**Bonvolu sendi la aliĝilon kaj vian antaŭpagon al :**

André Grossmann  
5, rue des Pyrénées  
68390 BALDERSHEIM

**Ĉekoj nome de:** André Grossmann

CCP 819 34 U Strasbourg

**Internaciaj ĝiroj al: IBAN:**

André Grossmann  
FR6920041010150081934U03669

**BIC:** PSSTFRPPSTR

**Pliaj informoj ĉe**

**André Grossmann:**

andreo.ag16@free.fr

Tel. 03.69.54.46.93

poŝtel. 07.82.21.97.34

**kaj Edmond Ludwig**

esperanto.eludwig@orange.fr

Tel.:03.89.77.52.56

Aktualigita staĝo-programo ĉe:

<http://esperanto.france.est.free.fr>

#### KURSOJ

**C: Paroliga kurso:** Tute en Esperanto.  
Gvidas Edmond Ludwig

**D: Seminario:** Prelegas Spomenka Štimec

En tiu ferio-centro troviĝas pluraj domoj, ni loĝos en du domoj.

En la domo: **Arche** troviĝas ĉambroj kun necesejo kaj duŝejo kaj la restoracio.

En la domo **Colombe** troviĝas ĉambroj kun necesejo kaj duŝejo sam-etaĝe kaj ankaŭ la salonoj por prelegoj kaj kursoj.



**Provizora Programo:****Vendrede 20-an de aprilo**

- 17a Akcepto de la unuaj alvenantoj
- 17a30 eblas libere viziti
- 19a Vespermanĝo
- 20a30 EFE:Vojaĝo tra pasinto kaj Anjo AMIKA nin kantigos
- 21a45 Malfermo de la knajpo..

**Sabate 21-an de aprilo**

- 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30 Turismado vizito al Murbach
- 12a Reveno al la staĝejo
- 12a30 Tagmanĝo
- 13a30/14a30 Akcepto de alvenantoj
- 14a/14a30 Prezento de la novaj libroj de la libroservo
- 14a30/18a Kursoj C kaj D.
- 19a Vespermanĝo
- 20a30 Distra vespero
- Poste aŭkcia vendado
- Poste Knajpo malfermita

**Dimanĉe 22-an de aprilo**

- 8a30 ĝis 9a30 Matenmanĝo
- 9a30/12a Kursoj C kaj D
- 12a30 Tagmanĝo
- 13a30 Komitat-kunsideto
- 14a Turismado
- Poste: disiĝo

**KURSOJ****C: Paroliga kurso:**

Tute en Esperanto.  
Gvidas Edmond Ludwig

**D: Seminario:**

Prelegas Spomenka Ŝtimec


**Aliĝilo por la 83a Regiona Staĝo de Esperanto en Rimlishof la 20/21/22ajn de aprilo 2018**

S-ro S-ino	Familia nomo	Persona nomo	Aĝo, malpli ol 18 aŭ studento	Aliĝ-kotizo	Elektita kurso
1	ĉef-aliĝanto				
2	kun-aliĝantoj				
3					
Adreso					
Telefona: Ret-adreso:					
Mi preferas manĝi vegetare <input type="checkbox"/> En la domo ne troviĝas pano sen gluteno, bonvolu mem zorgi.					
Mi pagas la tutan restadon aŭ minimume la aliĝkotizon: ..... per ĉeko <input type="checkbox"/> per ĝiro <input type="checkbox"/> per internacia ĝiro <input type="checkbox"/> al André Grossmann Krom grava evento, la aliĝkotizo ne estas repagebla.					
Mi deziras ricevi mapeton por helpi la alvenon al la staĝo (signu) <input type="checkbox"/>					
<input type="checkbox"/> Mi elektas ĉambron kun necesejo kaj duŝejo <input type="checkbox"/> 1-litan ĉambron <input type="checkbox"/> 2-litan ĉambron <input type="checkbox"/> plurlitan ĉambron <input type="checkbox"/> Mi elektas ĉambron sen necesejo kaj duŝejo, ili estas sametaĝe <input type="checkbox"/> 1-litan ĉambron <input type="checkbox"/> 2-litan ĉambron <input type="checkbox"/> plurlitan ĉambron <input type="checkbox"/> Mi deziras prunte-ricevi lito-tukon kaj tualet-tukojn (7 eŭroj)					
<b>Kiam kaj kiom da manĝoj kaj tranoktoj, bonvolu kompletigi</b>		Vendrede	Sabate	Dimanĉe	
Tagmanĝo					
Vespermanĝo					
Tranoktado :					

**Anjo AMIKA**

Ne plu ofte eblas aŭdi en Esperantio profesiajn artistojn, kiajn ni ĝuis antaŭ la falo de la Fera Kurteno, kiam la okcidenteŭropaj ŝtatoj subvenciis Esperanton. Escepto resta Anna Bartek – artista nomo Anjo AMIKA – profesia kantistino el Hungario. Ŝia repertuaro ampleksas modernajn, klasikajn kaj ekleziajn kantojn. Ŝiaj diskoj estas eldonitaj de Kooperativo de Literatura Foiro, en Svislando.

Ni scias, ke ŝi havas admirantojn en nia regiono, kie ŝi jam kantis (printempa staĝo en Landersen – Valo de Munster, en marto 2009). Cetere: ŝi bone memoras tiun ĉi kantvesperon! Ŝi ankaŭ promesis kantigi la staĝanojn jam vendrede vespere. Trejnu viajn voĉojn!

**Spomenka Ŝtimec**

Spomenka Ŝtimec, esperantlingva kroata verkistino, nun famas en la tutmonda Esperantio. Kiel juna aŭtorino ŝi prelegis en Mulhouse dum nia 31-a federacia staĝo en 1991. Nun, post 26 jaroj ŝi revenos kaj prezentos la kroatan movadon, nian samlandanon Roger Imbert, kiu estis eminenta aktivulo en la zagreba movado. Ŝi kompreneble ankaŭ parolos pri sia verkaro! Ne maltrafu tiun ĉi rendevuon kun eminenta esperantistino.



La programo de ĉi-tiu planita staĝo estas ankoraŭ tute provizora.

Ni klopodos ĝin aktualigi kaj disponigi al vi elŝuteblajn programon kaj aliĝilon, ĉe nia retejo:

<http://esperanto.france.est.free.fr>

## La libroj de la jaro 2017

En sia trarigardo de la Esperanta libromarkato Paweł Fischer-Kotowski prezentas la plej atentindajn verkojn eldonitajn dum la pasinta jaro. Inter la atentindaĵoj, estas ankaŭ la papera libro de Pasporta Servo, kiu reaperis post sesjara paŭzo.

La jaro 2017 estis avara je novaj Esperanto-libroj. En la lastaj 12 monatoj sur la bretoj de la Libroservo de UEA aperis nur iom pli ol 150 novaj varoj, plejparte libroj.

Ne temas nur pri libroj esperantlingvaj. Tiuj, kiuj ne estas en Esperanto, estas tradukoj el Esperanto aŭ ili temas pri la lingvo kaj movado.

Ĉiuj novaj libroj estas menciataj en la rubriko "Laste aperis" de la revuo Esperanto kaj en la samtitola reta novaĵletero. Ĉi-jare la rubriko aperis en 7 numeroj, dum pasintjare la listo publikigis 10 fojojn. Eĉ se la kvanto de novaĵoj estas malpli granda, ne nepre estas facile orientiĝi en la merkato. Kiuj interesaj titoloj surmerktiĝis en 2017? Same kiel pri 2016, mi pretigis subjektivan trarigardon.

**Prozo originala** Dum la ĵus finiĝinta jaro surmerktiĝis tri novaj originalaj romanoj, ĉiuj el plumoj jam konataj al la publiko. La unua el ili estas **Amo inter ruinoj** de Trevor Steele, kiu fakte eliris el la presejo ankoraŭ fine de la antaŭa jaro kaj tial portas la jaron 2016 titolpaĝe. Kvankam la intrigo disvolviĝas en la Esperanto-medio de la komencaj 1990-aj jaroj, la titolaj "ruinoj" ne priskribas nian movadon, kiu tiutempe estis pli vigla, sed aludas la disfalantan tiam Sovetunion. La ĉefrolulo estas la aŭstraliano Travis, kio povas pensigi kiagrade la rakonton diktis la realo. La libro estas verkita en Steele-a stilo, spicita per manpleno da kuraĝaj scenoj. [havebla en nia libroservo](#)



Ĉe la sama eldonejo aperis fine de 2017 ankaŭ **Murdo en la teatro**, la sepa krimromano de Ronald Cecil Gates. Li estas sendube nun la plej fekunda aŭtoro de tiu genro en Esperanto. Ĉi-foje la trovita mortinto estas aktoro, kiu baldaŭ devus surscenejiĝi en la universitata teatro. Ankaŭ ĉi tiun fojon la murdiston serĉas la komisaro Roberto Elis, sed verŝajne li bezonis por tio pli da tempo, ĉar la libro, kun 150 paĝoj, estas pli longa ol la antaŭaj verkoj de Gates.

Tute alia estas la tria romano, **El ombro de l'tempo** de Sten Johansson, kun psikologiaj ambicioj. En la romano la nuntempo interplektiĝas kun la 1970-aj jaroj.

Tiel la bildoj el la juneco de la protagonisto helpas nin kompreni liajn hodiaŭajn sentojn kaj decidojn. Interese kiom aŭtobiografia estas tiu libro, en kiu la ĉefrolulo estas verkisto... 5 Ne romano, sed ene de la limoj de la rubriko "prozo originala", estas la libro de Kalle Kniivilä **La strato de Tanja**. Ĉi tiu nefikcia rakonto, verkita surbaze de dokumentoj kaj rememoroj, pentras historion de unu el la sankt-peterburgaj stratoj en la lasta jarcento. La aŭtoro uzas la 1,5 kilometrojn longan vojon kiel pretekston por rakonti pri la vojo de Sovetio kaj la post-soveta Rusio. Same kiel la tri antaŭaj libroj de Kniivilä, ankaŭ ĝi aperis preskaŭ samtempe en finna, sveda kaj Esperanta eldonoj.

**Prozo tradukita** Malofte ni spertas ke iu romano freŝe

aperinta nacilingve kaj aprezata de vasta landa publiko, tuj ricevas Esperanto-tradukon. Tiel okazis pri **La nigra patrino Tero** de Kristian Novak, kiun elkroatis Josip Pleadin. Alia atentinda traduko estas la galega **Memoraĵoj de kampara knabo** de Xosé Neira Vilas, kiun esperantigis Suso Moinhos. Ĉi tiu dua eniris la prestiĝan Serion Oriento-Okcidento kun n-ro 53.

Notindas ankaŭ **Kara mia homo** kaj **Mi respondas pri ĉio**, la du lastaj volumoj el la trilogio La afero al kiu vi servas de la fama soveta verkisto Jurij German, en la Esperanto-versio de Jurij Finkel.

**Esperanto-movado** La plej grava primovada libro en 2017 estas sendube **Kie miozotas memor'** de Ed Borsboom, kiu eble unuavide ne ŝajnas tia pro sia malgranda formato. Kolekto de trideko da esperantistaj portretoj en mallonga, anekdoteca formo estas io, kio povas ekinteresi eĉ tiujn, kiuj "ĉi tien venis por ebriiĝi ...". Kvankam seriozaj esperantologiaj studoj, ankaŭ biografioj, estas bezonataj – kaj Borsboom mem estas sukcesa sur tiu kampo kun siaj "Vivo" -j de Lanti kaj Cseh – tiu ĉi formo povas atingi pli vastan publikon. Tio ne nur kontribuas al konstruo de komuna fundamento por la esperantistaro (kaj ne nur novuloj!), sed ankaŭ povas sproni al pliaj esploroj kaj legaĵoj pri unuopaj personoj kaj fenomenoj. Nepre rekomendinda!




Lige kun la 100-a mortodatreveno de L. L. Zamenhof UEA edonis **Zamenhof en Varsovio** de Roman Dobrzyński, Esperanto-versio de la pollingva originalo eldonita samjare. La libro pretendas esti samtempe iom gvidlibro pri Varsovio, iom historia verko pri la urbo, iom pri Zamenhof mem. La aŭtoro nenecese serĉas polecon de Dro Esperanto.

Alia libro kiun mi klasis primovada, kvankam ĝia teamo estas iom pli vasta, estas biografio pri "eksterordinara homo" (eĉ laŭ la subtitolo) **Francisko Valdomiro Lorenz**, verkita en la ĉeĥa de Vlastimil Novobilský (Esperanto-traduko de Margit Turková). **Omaĝe al Tibor Sekelj** estas kolekto de kvar prelegoj prezentitaj en la samtitola seminarieto en Bjelovar en oktobro 2016.

**Reeldonoj** La eldonejoj Libro-Mondo kaj Fonto daŭrigas laŭdindan reeldonan agadon. Ĉe la unua reaperis interalie la versdramo de Geraldo Mattos, **Ivan la Sesa**. La originala tragedio aperis unuafoje en 1953 kaj estis tre avangarda por sia tempo.

Aliaj reeldonoj de originalaĵoj estas **Karlo** de Edmond Privat – per ĉi tiu 16-a el la oficialaj eldonoj la rakonto certigas al si la unuan lokon inter la plej ofte reeldonitaj Esperantaj beletraĵoj. Ĝi ja estas konata al preskaŭ ĉiuj esperantistoj, verkita en facila lingvaĵo kaj legata kutime tre frue post la unua kurso. Nun por la unua fojo en iom arta eldono, kun malmola kovrilo.





Sur la merkaton revenis ankaŭ **Printempo en la aŭtuno** de Julio Baghy, kiu laŭ la intencoj de la eldoninto malfermas novan eldonserion, en kiu aperos la tuta verkaro de Paĉjo – fakte tiu, kiu legis la vastajn tavolojn de esperantistoj en la 1930-aj jaroj kaj ĝis nun restas aŭtoro ŝatata kaj konata en nia komunumo, eĉ por tiuj, kiuj ne aparte interesiĝas pri literaturo.

La fama traduko de la pola **Faraono** de Bolesław Prus en la plenumo de Kazimierz Bein fermas la liston de la reeldonoj de Fonto de la verkoj de Kabe. Ankaŭ nun la rakonto pri malnova Egiptio aperas en tri volumoj, kvankam aspekte pli modestaj ol la antaŭaj du eldonoj, kun kovrilpaĝoj laŭ la stilo de la fruaj 1990-aj jaroj. Tamen, ĝi ja estas interesa por iu, kiu ne volas aŭ ne povas legi ĝiajn polvokovritajn antaŭulojn (la lasta el 1957). [havebla en nia libroservo](#)

La eldonejo Riveroj rehavigis al ni la novelaron **Pri arto kaj morto** de nia plej fama japana literaturisto, Miyamoto Masao. Temas pri represo de la kolekto de nefikciaj originalaj rakontoj el 1967. Atentinda ne nur pro la “ekzotikeco” de la aŭtoro, la ĉefa reprezentanto de la Oriento en la Esperanto-literaturo, sed ankaŭ pro ĝiaj artaj valoroj. Alia orientaĵo estas kolekto de noveloj, kiun Korea Esperanto-Asocio aperigis lige kun la 102-a UK en Seulo. Nome, la koreaj samideanoj pretigis duan eldonon de la interesa **Korea antologio de noveloj**.

Pro kronikista devo mi menciuj ankaŭ la reeldonojn de la astronomia manlibro **La kosmo kaj ni** de la duopo David Galadí-Enríquez – [havebla en nia libroservo](#)

Amri Wandel, kaj de la brila eseoj de Claude Piron **Psiĥaj reagoj al Esperanto**, kiu verŝajne nur pro la fantazio de la eldoninto ricevis novan ortografion (origine: Psikologiaj reagoj...). Estas io perversa en “bonlingvigo” de la titolo donita de iu, kiu aŭtoris La bona lingvo... La 55-paĝa pironaĵo enhavas ankaŭ la eseon Afazio kaj du aliajn lingvorilatajn tekstojn.

**8 Faka literaturo kaj (inter) lingvistiko** Da fakaj verkoj ne venis abundo. Krom la tradicia **IKU-libro**, ĉi-jare eldonita sur luksa, peza papero, kun malmola kovrilo (tute netaŭge por tia libro, kun same netaŭga prezo), venis ankaŭ **Elektitaj tekstoj pri internacia juro** de Ivo Lapenna.

Temas pri kvardeko da tekstoj publikigitaj en la jaroj 1949–1992 tra la gazetaro, nun kolektitaj kaj eldonitaj unuvolume kaj tiel pli facile konsulteblaj.

El la kampo (inter)lingv(istik)a menciindas nur la eldonaĵoj de André Cherpillod.

Precipe la kolekto **Promenante tra la lingvoj...**, en kiu la aŭtoro malkovras plej diversajn strangaĵojn kaj mirindaĵojn de niaj lingvoj, sed ankaŭ la broŝuro **Universalglot** pri la unua planlingvo de natureca tipo el 1868 kaj lia traduko de la 35-paĝa lernolibreto **Okcidentalo en kvin lecionoj**.

**Vortaroj kaj terminaroj** La nove aperintaj vortaroj estas la Serba-Esperanta (27 mil kapvortoj), Esperantavjetnama (10 mil kapvortoj, abundaj ekzemploj) kaj Esperanta-ĉeĥa (16 mil kapvortoj). Krome, aperis **Rekomendata terminaro Esperanto-angla kaj angla-Esperanto por tradukantoj de**

**oficialaj dokumentoj kaj gazetaraj komunikoj**, kompilita de Humphrey Tonkin kaj Victor Sadler. La nomoj de la aŭtoroj sufiĉu kiel recenzo pri ĝia kvalito – nepre havenda por ĉiu, kiu en nia movado serioze okupiĝas internacivele pri eksteraj rilatoj.

**Ali-lingvaj libroj** 9 El la novaj libroj en la roterdama libroservo, kiuj ne estas en Esperanto, la plej grava estas la anglalingva eldono de **La danĝera lingvo (Dangerous Language)** de Ulrich Lins en la traduko de Humphrey Tonkin. Iom kosta (ĉi-jare ĝi okupas la unuan lokon en la listo de la plej multekostaj: € 192,30!), bele eldonita ĉe neesperantista eldonejo, en du volumoj. Tiu libro ebligas iom komprenigi la Esperanto-movadon al neesperantistaj sciencistoj. Mi supozas, ke malmultaj emos aĉeti ĝin kaj meti poste sur la propran librobretaron, sed se vi havas la komforton libere elspezi tiujn ducent eŭrojn, eble konsideru fari donacon por iu proksima al vi universitata aŭ alia scienca biblioteko?

Alia bombo estas la germana traduko de **Turmstrato 4 (Turmstrasse 4)**, verkita de Hans Weinhengst kaj tradukita de Christian Cimpa. Ne ofte aperas nacilingvaj tradukoj de niaj originalaj romanoj, kaj tiun germanigon de verko el 1934 oni tute ne atendus. Tamen, la tradukinto sukcesis



konvinki la eldonejon aperigi la tradukon kaj la rezulto estas admirinda. Mi mem ne konas la germanan, sed de aliaj mi aŭdis nur laŭdojn pri la lingvaĵo. La aspekto estas modela. Ho, se niaj Esperanto-libroj povus aperi tiel bele eldonitaj!

**La specie bambina** estas itala traduko de la ĉefverko de William Auld el la plumo de Nicolino Rossi. Kiom malfacile tradukebla estas La infana raso scias ĉiu, kiu almenaŭ trafolumis la libron. Pri la rezulto mi ne kompetentas juĝi, sed mi instigas niajn italajn samideanojn ĝui la verkon. Aldonan legoplezuron devus certigi la spegulpaĝa preso de la originala teksto en Esperanto.

Inter la menciindaj libroj el 2017 estas ankoraŭ la nova eldono **Pasporta Servo**, kiu revenis en la presita formo post 6-jara paŭzo. Eĉ se ĝi enhavas diversajn misteraĵojn el la tipo de Jarlibro 2017, pro la nunaj cirkonstancoj ĝi estas laŭdinda jam pro la fakto mem ke ĝi entute aperis. [havebla en nia libroservo](#)

La fama lernolibro de Stano Marček, Esperanto per rekta metodo, ĉi-jare ricevis tradukojn en la latva kaj araba lingvoj kaj estas jam certe lernolibro nesuperebla de iu ajn alia per nombro de tradukoj. Precipe al tiu lasta mi deziras merkatan sukceson, al kiu certe multe kontribuos Renato Corsetti.

**Paweł Fischer-Kotowski** La



**La 26-a Internacia Esperanto-Semajno de la kulturo kaj Turismo okazos ĉi-jare sude de Barcelono en Salou de la 29a de septembro ĝis la 6a de oktobro 2018 En la ĉi-apuda hotelo. La tuto kun kompletaj pensionoj en tre komfortaj ĉambroj.**

En la programo estas planitaj plurnivelaj kursoj kaj prelegoj.

**Ateliero pri Esperanto**, en tute kvin sesioj gvidataj de S-no Luz Vázquez.

Inter la prelegantoj: Zita Blaust, Miguel Fernández, Barbara Pietrzak, Abel Montagut, Pere Navarro, eble aliaj.

**Vesperaj programoj** kun koncertoj, interkonatiĝoj ktp.



#### ALIĜKOTIZOJ

Ĝis la 30-a de aprilo ..... 25 €

De la 1-a de majo ĝis la 31-a de julio 35 €

De la 1-a de aŭgusto ĝis la 30-a de septembro 45 €

La aliĝkoto ne estas repagebla.

Kompleta pensio: 43 € en dulita ĉambro po persono kaj tago. 55 € en unulita ĉambro po persono kaj tago

PAGO 25% de la tuto sumo ĝis la 31-a de marto, la cetero ĝis la 31-a de Aŭgusto per bankĝiro al:  
OPENBANK ES58 0073 0100 5405 0515 4366

BIC: OPEN ESMM

KORESPONDA ADRESO:

S-ino Rosa López, Granollers 3, 13, 3,  
ES-08225 Terrassa- Barcelona

ret-adreso: Marilo1950@hotmail.es

**Pliaj informoj kaj aliĝilo troviĝas ĉe:**

**<http://esperanto-salou.blogspot.com.es/2018/01/aligilo-salou-2018.html>**

**Eblas rete aliĝi.**

**La bulgara verkisto Julian Modest prelegos en Bischheim (apud Strasburgo) en la kafejo Divanoo (25A Route de Bischwiller) vendrede la 1-an de junio je la 19-a 30. Li parolos pri "La plej allogaj bulgaraj urboj ĉe Nigra Maro" kaj pri sia verkaro.**



Après quelques années de non-parution pour cause de difficultés financières Unesco Kuriero, la version espérantophone du Courrier de l'UNESCO, revoit le jour grâce à un mécène chinois, membre du comité de UEA, M. Trezoro Huang Yinbao. L'édition de la revue se fera en Chine, mais le réseau de traducteurs vers l'espéranto couvre le monde entier.



## Ni lernu per enigmoj kaj distraĵoj

JP	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2						■				
3						■				
4			■							
5		■				■		■		
6					■					
7							■			
8				■		■				
9										■
10								■		

### Ni ridu



Du amatoraj ĉasantoj ĉasas alkon en Kanado. Ili venis per aŭtomobilo, lasis ĝin apud lago, kaj poste iris piede dum unu horo.

Subite ili ekvidas alkon, pafas, kaj la alko falas, mortinta.

Granda problemo: Kiel porti ĝin al la veturilo?

- Ni tiru ĝin per la vosto, tio estos la plej bona maniero.

Ili tion faras, sed ne iras rapide, ili multe ŝvitas kaj la veturilo estas ankoraŭ malproksima...

- Stultuloj, diras loka ĉasisto, kiu pasas apude. Vi ne tiras ĝin bone. Vi devos tiri ĝin per la kornoj, tiel la haroj de la besto estos en ĝusta direkto, kaj ĉio iros glate.

Ili decidas fari tiel, kaj post momento :

- Tiu viro pravis, estas nun multe pli facile, sed kial ni estas pli kaj pli malproksimaj de la veturilo ?

Dum procezo, la juĝisto demandas al atestantino, tre eleganta virino:

- Ne forgesu diri la tutan veron. Kia estas via aĝo?  
- Mi aĝas 25 jarojn kaj kelkajn monatojn?  
- Bonvolu diri kiom da monatoj.  
- 258 monatojn

Viro revenas de sia laboro pli frue ol kutime, kaj li trovas tri glasojn sur la tablo de la kuirejo. Videble iuj trinkis brandon.

Li vokas sian malgrandan filon :

- Ho, ĉu venis vizitantoj ĉi posttagmeze?  
- Jes, viro venis kaj patrino servis al li malgrandan

### HORIZONTALALE

1. Person', kiu iras kun iu.
2. Grizeta metal'. Avenu'.
3. Aktor'.
4. Prepozicio. Ekzakta.
5. Bileto sen vokaloj. Konjunkcio.
6. Cedi. Regi.
7. Malriĉa loĝejet'. *Inverse*: reĝa moŝt'.
8. Sufikso. Tabelvorto.
9. Mezur-unu' por spacaj anguloj.
10. Somalia urb'.

### VERTIKALE

1. Aktiva opozici'.
2. Rondoturn' de fluido. Animalo, Stulta kaj kruda homo.
3. Vicmontra numeralo. Granda, aparta animal'.
4. Bronzepoka ŝtoneg'. KOLORA sen kolo.
5. Kunig' de multaj fadenoj. *Inverse*: ŝtatan' de norda lando.
6. Numeralo. Adverbo. Supernatura estaĵ'.
7. *Inverse*: ŝtatan' de okcidenta azia lando. Lardtort'.
8. Diferenca. Vicmontra numeralo.
9. Membro de herezia doktrino.
10. Diktatura politika reĝim'

glason da brando .

- Sed kial tria glaso ?

- Estis por mi! Mi trinkis ĝin !

- Kaj vi ne estis malsana?

- Tute ne! Sed panjo kaj la viro ne sentis sin bone, ili devis kuŝiĝi.

Solvo de la KVE de La Informilo 180

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1	K	A	B	R	I	O	L	E	T
2	A	D	E	■	S	I	A	M	O
3	L	I	R	I	K	■	B	O	L
4	D	A	L	■	I	N	I	C	E
5	R	U	I	N	A	■	R	I	D
6	O	■	N	E	■	K	I	O	■
7	N	E	■	M	A	R	N	■	E
8	E	L	P	E	L	I	T	O	J
9	G	I	P	S	O	■	O	R	O

## ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2018 ĝis 2020

La abon-periodo 2017 jam finiĝis per la lasta numero 180. Ĉi-tiu numero 181 jam estas la unua de la jaro 2018. Ĝi estas la lasta sendita al ĉiuj malnovaj abonintoj. La venontan numeron 182 ricevos nur la abonantoj de la jaro 2018.

La adres-etikedo de via Informilo informas vin pri viaj pagoj. La unua linio antaŭ la adreso konsistas el la adreso-kodo, la abon-jaro, pago (A=abonanto, F=federacia membro, poste UFE ktp.) kaj eventualo pago por la sekvantaj jaroj 2018 - 2019

Se post via adreso troviĝas la mesaĝo "Fino de abono!!", tio signifas, ke vi ankoraŭ ne pagis vian abonon al La Informilo por la jaro 2018. Tiam bonvolu ĝin senprokraste pagi laŭ la ĉi-suba tarifo.

Sam-okaze eblas pagi vian UEA-kotizon laŭ la ĉi-suba tarifo al nia kasisto, kiu senprokraste ĝin perados al UEA.

		Jaroj:	2018	2019	2020	
		Abono por la papera versio:	17 eŭroj	17 eŭroj	17 eŭroj	
		Abono por reta versio en formato pdf:	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj	
		Federacia kotizo:	7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj	
		Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj:	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj	
<b>UEA</b>	MG	<ul style="list-style-type: none"> <li>• Individua Membro kun Gvid-libro tra la Esperanto-movado.</li> <li>• Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkluzive 34 jarojn, membro en TEJO kun la revuo Kontakto sen plia abonpago).</li> <li>• Individua Membro-abonanto: kiel MJ(-T) plus la revuo Esperanto</li> </ul>				
	MJ(-T)					11 eŭroj
	MA(-T)					26 eŭroj
<b>Pag-manieroj</b>	<b>1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio:</b> <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto:					
	<b>2. Per bankĉeko aŭ poŝtbankĉeko je la nomo de:</b> <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio					
	<b>3. Por Germanio al nia peranto:</b> Hans-Dieter Platz Poŝtĝirokonto: (menciu la celon de via pago) IBAN: DE13 5451 0067 0091 8566 76 - BIC: PBNKDEFFXXX					
	<b>4. Per internacia ĝiro</b> je la nomo de <u>Esperanto France-Est</u> kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adreskodon)					
	<b>5. Al UEA-konto de TAKE ekat-i (menciu la celon de via pago kaj vian adres-kodon)</b>					

Libroj eldonitaj de Esperanto France-Est aŭ akireblaj ĉe nia kasisto

### **"De Karlis al Carlo Rememoroj"**

Kortuŝa rakonto pri la travivaĵoj de Carlo Nicolodi en malfacila periodo de la dua mondmilito, de Latvio al Italio, filo de Esperanto-paro, latva kaj itala. 12 + 3,10 = 15,10 eŭroj

### **Paul-Georges KOCH (1908 - 1982)**

Eta selekto de poemoj tradukitaj el la germana fare de E.Ludwig 1,50 + 1,50 = 3 eŭroj

### **Knabaj petolaĵoj** Poemoj de Gérard LESER en la alzaca,

tradukitaj al Esperanto de E. Ludwig 1,50 + 1,50 = 3 eŭroj

### **La harplektaĵo de Sylvie Reff** Poemoj en alzaca

kun traduko al Esperanto de E. Ludwig 1,50 + 1,50 = 3 eŭroj

### **Etaj rakontoj pri al Katedralo de Strasburgo**

Ĝin verkis kaj kompilis Sûzel PAILHES. Ĝi aperis en 12 lingvoj. En la Esperanto-versio ankaŭ aperas la hispana kaj la rusa lingvoj, 48-paĝa libro kun tre solida kovril-paĝo 12 + 4,80 = 16,80 eŭroj

### **Poŝamiko** Jen agrabla libreto, kiu trafe prezentas sur 40 paĝoj, gramatikajn resumojn, tekstetojn, kelkajn

ekzercojn kaj laŭtemajn bild-vortarojn riĉe kolor-ilustritajn. 5,10 + 1,50 = 6,60 eŭroj



**Barato** estas federacia ŝtato situanta en Suda Azio sur la hinda subkontinento ĉe la Hinda Oceano kaj ĝi havas 7000 kilometrojn longan marbordon. Oriente ĝi najbaras kun Bangladeŝo kaj Birmo (Mjanmaro). Norde kaj nordoriente kun Ĉinio, Butano kaj Nepalo. Nordokcidente ĝi limas kun Pakistano. Sude, trans la maro troviĝas je distanco de 65 km la insulo Srilanko.

Barato estas multnacia ŝtato. Ĝia nomo devenas el sanskrita nomo de la hinda reĝo *Bharat*. En la jaro 1947 ĝi sendependiĝis.



सत्यमेव जयते

Barato estas la sepa plej granda lando kaj kun pli ol unu miliardo da loĝantoj ĝi estas konsiderata la dua plej dense loĝata lando en la mondo.

Nombro de loĝantoj estas 1 210 193 422 en la jaro 2011. Denseco de loĝantoj je km<sup>2</sup> estas 324.

La ĉefurbo estas Nov-Delhio (New Delhi) havas 12,8 milionojn da enloĝantoj.

Aliaj grandaj urboj estas: Mumbajo (*Bombaj*) 16,4 mil. Kolkato (*Calcutta*) 13,2 mil. Ĉ enajo (*Madrás*) 6,4 mil. Hajderabado (*Hyderabad*) 5,7 mil. Bengaluro (*Bengaluru*) 5,3 mil.

La rivero Gango (*Ganga*) estas plej grava sankta rivero en Barato. Ĝi naskiĝas en himalaja montaro kaj longas je 3 090 km. Entute en Barato ekzistas sep sanktaj riveroj. La plej alta monto estas Kanĉenĝango. Ĝi mezuras 8 598 metroj kaj ĝi estas la tria plej alta monto en la mondo.

La plej antikva historio de la loko datiĝas ekde la tria jarmilo antaŭ nia erao. La tri plej disvastigitaj religioj estas hinduismo, islamo kaj kristanismo, sekvas sikiismo kaj budhismo. La socio estas multetna kaj multkultura. Ekzistas pli ol mil lingvoj kaj dialektoj, sed agnoskitaj estas 22 oficialaj lingvoj. En pli edukita medio oni parolas ankaŭ la anglan.

La ĉefa agrikultura produkto estas rizo. Krome estas kultivataj grajnoj - tritiko kaj milio, kotono, juto, moruso. El leguminacoj plej oftas fazeoloj, lentoj kaj pizoj, plie sojo, sezamo, sukerkano, nuksoj, teoplantoj kaj subtropikaj fruktoj: bananoj, mangoj citrusoj.

El politika vidpunkto temas pri federacio kun socialisma kaj demokrata parlamenta organo, foje agnoskata kiel la plej granda demokratio en la mondo.




Ĝi membras en Komunumo de Nacioj (Brita Regno), havas nukleajn armilojn kaj disponas propran kosman programon. La unua barata kosmonaŭto estas *Rakesh Sharma*.

La ekonomio de Barato atingas post Ĉinio la plej altan kreskon en la mondo. Plie Barato estas konsiderata kiel unu el la plej gravaj potencoj.





Kutime oni iras al Barato por admiri monumentojn, antikvan arkitekturon kaj rafinecon de artaĵoj, renkonti homojn aŭ spiritan influon, ĝui naturon, okulfrapajn kolorojn kaj odorojn de spicoj, akrajn manĝojn, dolĉajn trinkaĵojn, gustumi variaĵojn de ekzotikaj fruktoj kaj legomoj.



Tamen oni renkontas ankaŭ alian realecon: ekstreman malriĉecon, polucion, putran malbonodoron, neimageblan tumulton. Tristas vidi almozulojn, malriĉajn familiojn meze de bruletantaj rubaĵoj, ĥaosan trafikon kaj seninterrompan bruon. Kontraste ĝojigas belega rigardo al barataj virinoj kun longaj densaj nigraj haroj vestitaj en koloraj sarioj. Tiel aspektas la unua impresio pri Barato.



La vivo en Barato estas peza por la plej granda parto de la loĝantoj, por eŭropanoj preskaŭ neimagebla. Oni havas la impreson troviĝi sur alia planedo. En regiono, kie naskiĝis la plejparto de la religioj, kie ŝarlatanoj kaŝas siajn sekretojn, kie la artistoj kaj muzikistoj transdonas sian ĉarmon kaj homan ĝentilecon, kie oni povas baniĝi en sankta Gango-rivero, vidi sanktajn bovinojn libere promenantajn sur la stratoj kaj meze de homamaso aŭ renkonti elefantojn kaj admiri mirindajn pejzaĝojn ne devus elreviĝi la vojaĝanto.

Granda parto de la naturaj elementoj havas por barataj sanktan karakteron.

Barata arkitekturo fiksiĝas en ĝiaj historio, kulturo, tradicio kaj religio. Antikvaj monumentoj speciale impresas ĉiun vizitanton.

Barato estas la lando de grandaj kontrastoj: lukso kaj mizero. Ĝi povas plaĉi aŭ malplaĉi. Malfacilas priskribi ĝin, necesas malkovri kaj memsperti. Gastoj certe ĝuas neordinarajn aventurojn, kio donas ĝojon kaj deziron reveni kaj ankoraŭ pli profunde konatiĝi kun ĝi. Ni estis bonŝancaj gustumi almenaŭ peceton de ĝi.



## VOJAĜO AL KOSTARIKO

### Rakontas Liba Gabalda pri vojaĝo farita en decembro 2017

Meze de decembro 2017 ni vojaĝis al Kostariko, kie ni pasigis unu monaton vizitante diversajn lokojn de la bela lando. Ĉi foje ne temis pri iu Esperanto-evento, nia deziro estis koni tiun misteran landon plenan de ekzotikajoj.

Kostariko, laŭ la traduko "Riĉa Marbordo" estas vere admirinda lando situanta en Meza Ameriko. Norde ĝi limas kun Nikaragvo kaj sude kun Panamo. Okcidente ĝiajn bordojn banas Pacifika oceano kaj oriente Karaiba maro. Ĝi kuŝas en tropika regiono. La medio rememorigis al ni Venezuelon, kie ni loĝis dum ses jaroj kun la diferenco pri pureco favore al Kostariko. Registaro kaj la



popolo tre zorgemas pri ekosistemo.

La lando apartenas al la plej disvolvigitaj demokratioj en la mondo. Ĝi fariĝis la unua lando de la mondo, kiu nuligis armeon fine de la jaro 1948.

Vasta natura riĉeco karakteriziĝas per virga pejzaĝo, koloraj sablaj plaĝoj bordurita per palmoj, nebulaj praarbaroj, densaj ĝangaloj kaj bunta flaŭro kaj faŭno. Oni povas diri, ke ĝi estas paradizo sur la tero. Sur la teritorio de la lando troviĝas kelkdekoj da naciaj parkoj, multaj protektitaj lokoj, naturaj rezervejoj kaj ne mankas amaso da vulkanoj, sennombraj akvofaloj kaj kelkaj varmaj fontoj. La lando kuŝas en tektona zono, kie de tempo al tempo okazas tertremoj. En oceano

danĝeras fortaj kontraŭfluo pri kiuj la vizitantoj estas avertitaj.

Kostariko havas proksimume kvin milionojn da loĝantoj. La plej multo troviĝas en la ĉefurbo *San José* (Sankta Jozefo) kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Krom kelkaj koloniaj domoj, muzeoj, parkoj, placoj



kaj Nacia teatro nenio tro alloga troviĝas en la metropolo. Vizitanton povas interesi bazaro kaj zoologia ĝardeno.

Oficiala lingvo estas la hispana, sed eblas interkompreniĝi per la angla kaj foje ankaŭ per la franca. Ofte mi devis diri hispane: "Kial vi alparolas min angle, se mi ne komprenas vin"? Lokanoj nomas sin "Tico" kaj ofte uzas formulon "Pura vida", kio povas signifi: "ĝoja vivo", "bonega vivo" aŭ simple "nur vivo". Kostarikanoj estas tre ĝentilaj, amikemaj kaj helpemaj. Se oni parolas hispane ili tuj konversacias kaj tiamaniere oni ricevas multajn informojn. Interesa rimarko estas, ke libere promenantaj hundoj estas tre mildaj kaj tute ne agresemaj. Ili bojas nur inter si kaj eventuale postkuras motorciklojn.



Historia lokomotivo en Palmar del Sur

Stabila politika kaj ekonomia prospero altiras plurajn eksterlandanojn instaliĝi en la lando. Elstaras italaj kaj

svisaj komunumoj. Ekzistas ankaŭ aliaj latinamerikaj grupoj. La sukceso en ekonomio kuŝas en ĉiam disvolviĝanta turismo, eksporto de elektronikajoj, produktado kaj eksportado de kafo, sukero, ĉokolado, bananoj, kaj aliaj tropikaj fruktoj. La kostarika kafproduktado estas tre altkvalita. Ekzistas vastaj banan-, ananas-kaj sukerkanplantejoj. Ne mankas papajaj kaj mangaj plantoj kaj arboj, kokos-palmoj. Tradicia produkto estas pentritaj ĉaretoj kaj skulptitaj maskoj el balzo. Ĝi estas la plej malpeza lignaĵo.



Rilate la trafikon la plej konvena estas aŭtomobilo. Per busoj eblas ankaŭ facile vojaĝi al diversaj interesaj lokoj. Vojoj ne estas ĉie bone prizorgataj. Ili estas polvaj kaj foje malfacile traireblaj. Por transportado ne mankas aviadil- kaj ŝip-rimedoj. Proksime al strandoj oni ŝatas uzi kvarciklojn kaj sur la plaĝoj promenantoj povas ĝui ĉevalrajdadon.

Ni traveturis Kostarikon de la nordo al la sudo ĝis la limo kun Panamo. Dum nia restado ni vizitis du esperantistojn kun kiuj ni pasigis tre agrablajn

tagojn. Ambaŭ rakontis pri siaj inĝenieraj studoj en Moskvo kaj ĝis nun ili scipovas paroli la rusan lingvon. Krom ili ceteraj homoj ne scias pri Esperanto. Do, mi kun plezuro donis informojn pri ĝi, eble ekĝermos intereso. Plurfoje ni renkontis indiĝenojn kaj en la vilaĝo *Boruca* ni spertis tritagan festadon de la nova jaro. Longe ni memoros pri belaj travivaĵoj kaj neforgeseblaj momentoj, kiujn mi eternigis sur fotoj... la rezulto aperas en la aldona fotaro.

*Liba Gabalda*





# Nia Vilaĝo

*Homo kaj naturo*



En la titolpaĝa artikolo ni mencias pri **nub-arbaro** (konata ankaŭ kiel – nebulaj arbaroj), kiu kovras montojn en la nordorienta regiono de Kolombio. Tie vivas la unika etnogrupo de indianoj el *U'Wa-tribo* (en Esperanto: uŭa).



En la nubbarbaro amasiĝas nuboj, kies humida aero kondensiĝas kaj produktas nebulon. Pro dispartigo de la nuboj, la reala precipitaĵo (pluvokvanto) duoblas tie dum la sekaj jarsezonoj.

Meze de la pasinta jarcento, oni faris eksperimentojn pri akvocirkulado en nubbarbaroj. Tiam montriĝis, ke ĝia kanopeo (arbopintoj), forprenas kaj vaporigas 20% malpli da precipitaĵoj (pluvofaloj) ol en aliaj arbaroj. Rezulte, la grundo en plubarbaroj perdas malpli da akvo kaj pli bone konservas la akvobalancon.

Nubarbaroj kreskas inter la du tropikoj (la norda - Kankra kaj suda - Kaprikorna), en Latinameriko, Kariba Insularo, orienta parto de Mezafriko, Sudorienta Azio, Indonezio kaj Novgvineo.



Temperaturo en nubbarbaro estas iom pli malalta ol sur senarabaj ebenaĵoj ĉe la ekvatoro kaj tio kreas taŭgan klimaton por abunda plantaro.

Malaltaj kaj kurbiĝintaj arboj estas tie kovritaj dense per senradikaj plantoj (**epifitoj**, scienca nomo: Epiphytum – *planta aerea*). Kutime, en nubbarbaro kreskas ankaŭ grandegaj erikoj, senecioj (?) latine - *Senecio* L. kaj lobelioj (?) - lat.: *Lobelia* L.



Epifitoj (*Planta aerea*)



*Senecio* L.



*Lobelia* L.

## La 9-a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE) 11.-17. 2. 2018

Kubo denove malfermis la pordojn al esperantistoj kaj okazigis la 9-an Tut-Amerikan Kongreson de Esperanto en Havano. Al la aranĝo aliĝis 240 partoprenantoj el 20 landoj inter kiuj krom latinamerikanoj, usonanoj kaj kanadanoj ĉeestis pluraj eŭropanoj kaj gesamideanoj el Japanio kaj Koreio.

La kongreso disvolviĝis en la hotelo Panamerikano en la orienta parto de Havano. Je dispono estis naĝejo, kie okazis interkona kaj internacia vesperoj, Esperanto-kabaredo kaj la adiaŭa festo.

La kongresa temo "Lingvoj kaj kulturoj: edukado por daŭripova evoluo en la Amerikoj" celas alproksimiĝon, edukadon kaj konduton de la homoj por favora agado, kiu estu utila por la planedo kaj por la estonteco de la homaro. La temon enkondukis kaj reĝisoris la prezidantino de la Kuba E-Asocio Maritza Gutiérrez González. Ŝi ankaŭ prezentis kaj donis informojn pri sia lando kaj pri la elsendoj en Radio Havano Kubo. Juan Ramón Rodríguez Gómes resumis la TAKE-kongresojn ĝis nun okazintaj.

La solena inaŭguro okazis en la teatro de la Nacia Belarta Muzeo kun la ĉeesto de la vicministro de la kulturo Fernando Rojas kaj aliaj eminentaj gastoj. Tuj poste komenciĝis diversaj programeroj, kiuj daŭris la tutan semajnon.

La programo estis vere riĉ-enhava. Krom pri la kongresa temo okazis diversaj prelegoj kaj prezentoj, konversaciaj rondoj, forumoj, kant-, danc- kaj instruatelieroj, libroprezentoj, origamio, tabluludoj, kvizoj, ILEI-kunsido, literatura rondo, aŭkcio. Oni parolis pri ĝemelaj urboj, pri radioamatoroj, pri tradicia kuba vestaĵo *Guayabera*, pri *Yumeiho* terapio kun praktika elmontro. Ni eksciis pri la kuba folkloro muziko, pri historio de Esperanto en Santiago de Kubo, pri la kultura projekto de la kantgrupo Amindaj kaj ilia premio ricevita en la Internacia Festivalo de Filmetoj

"Teo kaj Amo" kaj estis prezentita la lasta dokumentfilmo "Lekantoj el kristalo", kiu rakontas vivon en la montaro. Okazis forumo pri konsciigo kaj kapablo, UEA kaj ILEI ekzamenoj. Enkondukan prezenton por AMO-Seminario prezentis Sara Spanó la estraranino de UEA. Francesco Maurelli informis pri la Tutmonda E-Junulara Organizo (TEJO), kies prezidanto li estas.

Oni parolis pri Zamenhof-jaro kaj pri Esperanto en la interreta mondo. Interesuloj eksciis kiel labori teame pri konfliktoj kaj solvadoj, ni akiris sciojn pri la plej gravaj aspektoj de la internacia E-movado, pri ĝiaj strukturo, historio kaj kulturo.

Ariadna García Gutiérrez tre interese rakontis pri sistemoj por organizi kaj reprezenti informojn, ilia stokado kaj transformprocezoj kaj manieroj organizi ilin. Pri la plej elstara pensulo de la 19-a jarcento, José Martí, prelegis poeto kaj eseisto Juan Lázaro Besada. Maritza Gutiérrez González kaj Pedro Fernández Rodríguez donis informojn pri la klubo José Martí kaj kunlaboraj rilatoj inter la Kultura Societo kaj KEA.

De Harald Schicke ni eksciis pri la germana sansistemo kaj pri sanigaj efikoj de korea ginsengo.

Orlando Raola interese rakontis pri sia tridekjara perletera korespondado kun dokumentita





kolekto tiatempa. Pri la influo de la subsahara Afriko en la kuban kulturon, ĉefe en religio, muziko, lingvo kaj pri Santerio kaj afrokuba etoso parolis Juan Ramón Rodríguez Gomez. Julián Hernández Angulo, konata pro sia kanto "Kien la mondo iras" parolis pri gvidado de teamo kaj donis konsilojn kiel fondi kaj organizi novajn lokajn grupojn, kiel flegi viglan



kulturan vivon en la asocio. Alia lia prelego temis pri "Teoria kaj metodologia konceptigo por gvidado de la instrua kaj lerna procezoj de la angla kaj Esperanto".

Vilhelmo Lutermano parolis pri la Monda Asembleo Socia (MAS), precipe pri tradukado kaj eldonado de libroj. Li redaktas la francan monatgazeton pri politikaj kaj kulturaj analizoj *Le Monde diplomatique en Esperanto*. Post la prelego li malavare disdonis plurajn librojn al reprezentantoj de kubaj asocioj en diversaj landopartoj. Pri SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) parolis kaj informojn donis Floreal Gabalda. Li ankaŭ atentigis pri la 91-a SAT-kongreso okazanta en Kragujevac ĉi-somere en Serbio. Mi menciis la fervojistan kongreson en Vroclavo (Pollando) en majo kaj invitis al partopreno en ĝi.



Ni spektis du kubajn amuzajn teatraĵetojn: *Emelina Cundiamor* kaj "Franciska kaj la Morto", kiujn ni ege ĝuis. Nacia vespero okazis en la havana teatro *Retazos* kaj en la teatro *Raguel Revuelta* Saša Pilipoviĉ kaj Georgo Hanzlik prezentis la teatraĵon "La Kredito". Antaŭ la kongresejo estis prezentitaj ekzercoj de Ĉikongo sub gvido de Mayra Núñez Hernández.



Pluraj duontagaj ekskursoj permesis konigi al ni la ĉefurbon Havano kaj ĝian proksiman ĉirkaŭaĵon. Pluraj esperantistoj interesiĝis pri la ekskurso "Laŭ la vojo de Hemingway". La tuttagaj ekskursoj celis pli forajn lokojn.

La semajnon antaŭ la kongreso okazis granda Librofiro. KEA havis tie standon kaj donis informojn pri Esperanto kaj aktivadoj en Kubo. Multaj preterpasantoj

interesiĝis. En la informejo de la kongresejo eblis aĉeti kelkajn esperantaĵojn kaj memoraĵ-objektojn. Ĉe la fino de la kongreso pluraj Kubanoj estis honorigataj pro meritplena poresperanta laboro. Neforgeseblaj estis bongustaj vespermanĝoj en diversaj restoracioj. Tiamaniere ni malkovris la manĝkutimojn de Kubanoj.


La 9-a TAKE estis tre sukcesa kaj donis al multaj Kubanoj, kiuj ne ofte povas vojaĝi eksterlanden eblecon konatiĝi, amikiĝi kun alilandanoj kaj konvinkiĝi, ke Esperanto bone funkcias kiel internacia lingvo. Korajn dankojn al la organizantoj.

*Liba Gabalda*





Suda Koreio



Suda Koreio

**Nia foto-paĝo:  
Vintraj pejzaĝoj en 2017/2018  
en Suda Koreio  
kaj en Slovakio**



Slovakio



Slovakio



Slovakio